

08 PERDITA LETERO

„Boženka," diris sinjoro ministro al sia edzino, prenante egan porcion da salato, „hodiaŭ posttagmeze mi ricevis leteron, tio vin interesos. Mi devas ĝin prezenti al ministeria konsilantaro. Se ĝi malsekretiĝus, estus unu politika partio en ega embaraso. Jen, rigardu ĝin," diris sinjoro ministro, palpante unue en la maldekstran internan poŝon kaj poste en la dekstran.

„Atendu, kien nur mi tion," murmuris sinjoro ministro, palpante denove en la maldekstran internan poŝon; post kio li demetis forketon kaj komencis rasti ambaŭmane en ĉiuj ceteraj poŝoj. Atentema spektanto trovas ĉe tio, ke la ministro havas same surprizan nombron da poŝoj sur ĉiuj eblaj partoj kaj korpoŝankoj, kiel ĉiu alia normala viro; ke en ili li havas ŝlosilojn, kraĵojn, notlibrojn, vesperĵurnalojn, monujojn, oficaĵajn paperaĉojn; horloĝon, dentopinglon, tranĉilon, kombilon, malnovajn leterojn, poŝtukon, alumetojn, malnovajn kinobiletajn, fontplumon kaj plurajn aliajn objektojn de ĉiutaga vivo; kaj, palpante en la poŝoj, murmuris „kien mi nur donis tion," „mi estas ja frenezulo," „ni atendu," same kiel farus ĉiu alia homa estaĵo, palpanta en siaj propraj poŝoj. Sed la ministro-edzino ne dediĉis multe da atento al ĉi tiu agado, sed diris, kiel tion farus ĉiu alia sinjorino: "Mi petas vin, se vi prefere manĝus; alie ĝi fridiĝos."

„Bone," diris sinjoro ministro, reenmetante ĉian enhavon de siaj poŝoj en la koncernajn lokojn, „plej versimile mi ĝin lasis sur tablo en laborĉambro; tie mi legis la leteron. Imagu do al vi," li ekparolis viglege kaj prenis pecon da rostaĵo, „imagu, ke iu sendas al mi originalon de letero de - Nur momenton," li diris maltrankvile kaj ekstaris for de la tablo. „Mi rigardos nur en la laborĉambron. Ver-simile mi lasis tion sur la tablo." Kaj li estis for.

Kiam li ne revenis eĉ post dek minutoj, iris post lin sinjorino Božena rigardi en la laborĉambron.

08 ZTRACENÝ DOPIS

„Boženko," ŝekel pan ministr své choti, nabíraje si důkladnou dávku salátu, „dnes odpoledne jsem dostal dopis, to tě bude zajímat. Musím to předložit ministerské radě. Kdyby to vyšlo ven, byla by jedna politická strana v pořádné bryndě. Na, podívej se na to," děl pan ministr, sahaje nejprve do levé náprsní kapsy a potom do pravé.

„Počkej, kampak jsem to," bručel pan ministr, hmataje znovu do levé náprsní kapsy; načež položil vidličku a začal hrabat oběma rukama ve všech ostatních kapsách. Pozorný divák by přitom shledal, že takový ministr má stejně překvapující počet kapes na všemožných částech a stranách těla jako každý jiný řádný muž; že v nich má klíče, tužky, notesy, večerníky, tobolky, úřední lejstra, hodinky, párátko, nůž, hřeben, staré dopisy, kapesník, sirky, staré vstupenky do kina, plnicí péro a četné jiné předměty denní potřeby; a že hrabaje se v kapsách mumlá „kampak jsem to dal", „to jsem blázen", „počkejme", tak jako by činil každý jiný lidský tvor, hrabající se ve svých vlastních kapsách. Ale ministrova choť nevěnovala mnoho pozornosti tomuto ději, nýbrž řekla, jako by to učinila každá jiná paní: „Prosím tě, kdybys raději jedl; vystydne ti to."

„Dobrá," pravil pan ministr, dávaje veškerý obsah svých kapes zpátky do příslušných míst, „nejspíš jsem to nechal na stole v pracovně; tam jsem ten dopis četl. Tak představ si," spustil bujaře a nabral si kus pečeně, „představ si, že mně někdo posílá originál dopisu od – Jen okamžik," ŝekel neklidně a vstal od stolu. „Já se jen podívám do pracovny. Asi jsem to nechal na stole." A byl pryč.

Když se nevrátil ani za deset minut, šla se za ním paní Božena podívat do pracovny.

La ministro sidis meze de la ĉambro surtere specigante folion post folio, aktojn kaj leterojn, kiujn li forŝovis desur la skribotablo.

„Ĉu mi igu varmigi la vespermanĝon por vi?“ demandis sinjorino Božena iomete severe. „Tuj, post momento,“ diris la ministro distrite. „Plej versimile mi enŝovis tion ĉi tie inter la paperojn. Estus malsaĝe, se mi ĝin ne trovus... - Sed tio ne eblas; ĝi devas esti ie ĉi tie!“ „Do unue manĝu,“ konsilis la sinjorino, „kaj poste tion serĉu.“ „Tuj, tuj,“ diris la ministro incitite. „Nur kiam mi tion trovos. Ĝi estis tia flava koverto - Nu, kia frenezulo mi estas,“ li murmuris, specigante pluan stokon da paperoj. „Ĉi tie ĉe la tablo mi ĝin legis, kaj ne formoviĝis de ĉi tie, nur kiam oni vokis min al vespermanĝo - Kien ĝi povus perdiĝi?“

„Mi sendos la vespermanĝon al vi ĉi tien,“ decidis la sinjorino kaj lasis la ministron surtere meze de liaj paperoj. Poste ekregis silento, dume ekstere muĝis arboj kaj steloj estis falantaj.

Estis preskaŭ noktomezo, kiam sinjorino Božena komencis oscedi kaj iris singarde enrigardi la laborĉambron. La ministro, sen jako, taŭzita kaj ŝvitanta staris meze de la ĥaosa laborĉambro; ĉie surtere estis paperamasoj, la meblaro fortirita de la muroj, tapiŝoj ĵetmetitaj en angulo; sur la skribotablo staris la netuŝita vespermanĝo.

„Miadio, edzo, kion vi faras ĉi tie?“ ekdiris sinjorino Božena.

„Jesuo Kristo, lasu min trankvila,“ ekfuriozis la ministro. „Ĉu vi devas min ĝeni ĉiun kvinan minuton?“ Kompreneble, tuj li konsciiĝis, ke li maljustumas ŝin, kaj diris pli milde: „Tion oni devas traserĉi sisteme, ĉu vi komprenas? Parton post parteto. Ie ĉi tie ĝi devas esti, ĉar ĉi tien enpaŝis neniun krom mi. Nur se mi ne havus tiajn damnajn paperaĉojn!“

„Mi helpos al vi, ĉu vi volas?“ proponis komplete sinjorino Božena.

„Ne, ne, ĉion vi disĵetus ĉi tie,“ defendis sin la ministro, mansvingante meze de la nepriskribebla malordo. „Nur iru dormi, tuj mi -“

Je la tria matene iris sinjoro ministro kuŝiĝi peze ĝemante.

Ministr sedel uprostřed pokoje na zemi a probíral list po listu akty a dopisy, které shrnul z psacího stolu.

„Mám ti dát večeři ohřát?“ ptala se paní Božena tak trochu přísně. „Hned, za okamžik,“ děl ministr roztržitě. „Nejspíš jsem to zastrčil tady mezi ty papíry. To by bylo hloupé, kdybych to nenašel... – Ale to není možné; musí to tu někde být.“ „Tak se dřív najez,“ radila paní, „a pak to hledej.“ „Hned, hned,“ řekl ministr podrážděně. „Jen co to najdu. Byla to taková žlutá obálka – Inu to jsem blázen,“ bručel probíraje další stoh papírů. „Tady u toho stolu jsem to četl, a nehnul jsem se odtud, až mne volali k večeři – Kampak se to mohlo podět?“

„Já ti pošlu večeři sem,“ rozhodla paní a nechala ministra na zemi uprostřed jeho papírů. Potom se rozhostilo ticho, zatímco venku šuměly stromy a padaly hvězdy.

Byla skoro půlnoc, když paní Božena počala zívát a šla opatrně nahlédnout do pracovny. Ministr, bez kabátu, rozčuchaný a zapocený, stál uprostřed rozvrácené pracovny; všude na zemi byly hromady papírů, nábytek odtahán od stěn, koberce naházeny v koutě; na psacím stole stála nedotčená večeře.

„Proboha, muži, co to tu děláš?“ vyhrkla paní Božena.

„Ježíšikriste, dej mi pokoj,“ rozzuřil se ministr. „Copak mě musíš vyrušovat každých pět minut?“ Ovšem hned si uvědomil, že jí křivdí, a řekl mírněji: „To se musí prohledat systematicky, rozumíš? Kousek po kousku. Někde to tu musí být, protože sem nevstročil nikdo nežli já. Jen kdybych tu neměl takových zatracených lejster!“

„Já ti pomohu, nechceš?“ nabídla se soucitně paní Božena. „Ne, ne, ty bys mi to tu rozházela,“ bránil se ministr mávaje rukama uprostřed toho nevýslovného nepořádku. „Jen jdi spát, já hned –“
Ve tři hodiny ráno si šel pan ministr lehnout, těžce vzdychaje.

Tio ne estas ebla, li diradis al si; je la kvina alportis la poŝto tiun leteron en flava koverto; mi legis ĝin ĉe la skribotablo, kie mi laboris ĝis la oka; je la oka mi iris vespermanĝi, kaj proksimume post kvin minutoj mi kuris en la laborĉambron serĉi. Dum la kvin minutoj ja neniuj povis veni - Tiam elsaltis sinjoro ministro rekt piede el la lito kaj kuregis en la laborĉambron. Memkomprene, fenestroj estis malfermitaj; sed tio estis en la unua etaĝo kaj krome ankoraŭ fronte al strato - Tio tamen ne estas ebla, opiniis sinjoro ministro, ke iu penetras ĉi tien tra fenestro! Sed matene, li decidiĝis, mi devas tion verifi ankaŭ de tiu ĉi flanko. Denove enlitigis sinjoro ministro sian dikegan korpon. Ni atendu, li rememoris, foje mi legis en iu libro, ke letero plej probable eskapas atenton, kiam ĝi kuŝas rekte antaŭ la okuloj! Tondro al tio, kial tuj mi ne havis la ideon! Denove li kuris en la laborĉambron por rigardi, kio ĝuste kuŝas antaŭ la okuloj; kaj li vidis paperamasojn, eltiritajn tirkestojn, grandegan kaj senesperan malordon post sia serĉado. Sakrante kaj ĝemante, la ministro revenis en sian liton ne dormonte.

Li eltenis tion nur ĝis la sesa; je la sesa li jam kriis en telefonon insistante, ke oni veku ministron por internaj aferoj "en grava afero, ĉu vi aŭdas, homo?" Kiam fine li ricevis komunikon, li komencis febre: "Halo, sinjoro kolego, mi petas vin, sendu tuj al mi, sed tuj, ĉirkaŭ tri aŭ kvar plej kapablajn homojn. . . nu jes, detektivojn. . . memkomprene, la plej fidindajn. Perdiĝis al mi iu grava akto. . . sinjoro kolego, ĝi estas ia nekomprenebla kazo. . . jes, mi atendos ilin. - - Lasi ĉion en stato, kia ĝi estas? Ĉu vi opinias, ke tio devas esti? - Bone. - Ŝtelo? Tion mi ne scias. - Kompreneble, nur konfidence; al neniuj diru ion. Do mi dankas al vi; kaj pardonu, ke. . . Komplimenton, sinjoro kolego!"

Ĉirkaŭ la oka montriĝis, ke la plej kapablaj kaj plej fidindaj homoj estas eĉ sep; ĉar sep viroj en bulĉapeloj venis en la loĝejon de sinjoro ministro.

To ne estas ebla, ŝajnis al li; v kvin minutojn pli frue alportis poŝto ten dopis ve ŝlute obalte; ĉetl jsem jej u psaciho stolu, kde jsem pracoval aŝ do osmi; v osm jsem ŝel k veĉeri a asi za pēt minut jsem bēžel do pracovny hledat. Za tēch pēt minut pēce nikdo nemohl pŕijit - Tu vyskoĉil pan ministr rovnŕyma nohama z posteale a řitil se do pracovny. To se rozumŕ, okna byla otevřena; ale bylo to v prvŕnŕm poschodŕ a jeřtē k tomu do ulice - To snad nenŕ moŝnē, mŕnil pan ministr, ŝe by sem nēkdo vlezl oknem! Ale rano, umiŕoval si, to musŕm zjistiť i po tēhle strance. Znovu uloŝil pan ministr svē mohutnē tēlo do posteale. Poĉkejme, vzpomnēl si, jednu jsem ĉetl v nējakē knŕiŝce, ŝe takovŕ dopis nejspŕiř ujde pozornosti, kdyŝ leŝi rovnou na oĉŕh! Hrom do toho, ŝe mē to nenapadlo hned! Znovu bēžel do pracovny, aby se podŕval, co leŝi rovnou na oĉŕh; i vidēl hromady papŕrŕ, vytahanē zasuvky, nesmŕrnŕ a beznadējnŕ nepořadek svēho hledanŕ. Klna a vzdychaje vracel se ministr na svē loŝe beze spanku.

Vydržel to jen do ŝesti hodin; v ŝest uŝ kŕiĉel do telefonu, nalēhaje, aby vzbudili ministra vnŕtra „v dŕleŝitē vēĉi, slyřŕte, ĉlovēĉe?“ Kdyŝ koneĉnē dostal spojenŕ, spustil horeĉnē: „Haló, pane kolego, prosŕm vās, pořlete ke mnē hned, ale hned asi tŕi nebo ĉtyŕi svē nejschopnējšŕ lidi... nu ano, detektivy... to se rozumŕ, ty nejspolehlivējšŕ. Ztratil se mi jeden dŕleŝitŕ spis... pane kolego, to je takovŕ nepochopitelnŕ pŕŕpad... Ano, jā na nē budu ĉekat. - Nechat vřeĉko v tom stavu, v jakēm to je? Myslŕte, ŝe to musŕ bŕt? - Dobrā. - Krādeŝ? To nevŕm. - Ovřem, ĉistē dŕvĕrnē; nikomu o tom neřŕkejte - Tak vām dēkuju; a odpustŕte, ŝe... Poklona, pane kolego!"

K osmē hodinē se ukāzalo, ŝe tēch nejschopnējšŕh a nejspolehlivējšŕh lidi je dokonce sedm; neboť sedm muŝŕ v buŕŕnkāch se dostavilo do bytu pana ministra.

„Rigardu do, sinjoroj," parolis la ministro, enkondukante la sep plej fidindajn virojn en sian laborĉambron, „ĉi tie en la ejo mi lasis kuŝi iun... eh, tre gravan leteron... en flava koverto... adreso per violkolora inko..."

Unu el la plej kapablaj viroj spertoplene ekfajfis: „Tiu tion misordaĉis," li diris kun faka admiro, „damna porkulo." „Kiu nome?" diris la ministro embarasite. „Tiu ŝtelisto," opiniis la detektivo, observante kritike la malordegon en la laborĉambro.

Sinjoro ministro ete ruĝiĝis. „Nome," li rapidis diri, „tion mi mem iom disjetis ĉi tie serĉante ĝin; estas jene, sinjoroj, mi... eh, mi ne povas nepre ekskludi, ke la letero estas ie ĉi tie... mislokita aŭ enfalinta... Por ke mi esprimiĝu precize, ĝi ne povas esti ie alie nur en ĉi tiu ejo. Mi opinias, ke... jes mi rekte asertus, ke ĉi tiu ejo estas sisteme traserĉenda. Sed tio estas, sinjoroj, via afero, ke vi entreprenu... kio estas en la homa povo."

En la homa povo estas io ajn; tial tri el la plej kapablaj viroj fermis sin en la laborĉambro por ĝin sisteme traserĉi; du enketis servistinon, kuiristinon, dompedelon kaj ŝoforon; kaj la du lastaj foriris en la urbon ne sciate kien, por, kiel ili diris, komenci la esploradon.

Tiutage vespere deklaris la unuaj tri el la plej kapablaj, ke estas nepre ekskludite, ke la perdita letero estus en la laborĉambro de sinjoro ministro; ĉar ili elkadrigis ankaŭ bildojn, dispartigis la meblaron kaj numeris ĉiun paperon. La aliaj du konstatis, ke en la ministran laborĉambron enpaŝis sole la servistino, kiam ŝi laŭ ordono de sinjorino Božena alportis tien vespermanĝon, dum la ministro sidis surtere inter siaj paperoj; ĉar ne estas ekskludite, ke dume ŝi povis forporti iun leteron, estis komencita la esplorado, kiu estas ŝia amanto - li estis okupito en telefoncentralo, kiun nun diskrete gardis unu viro. La lastaj du estis esplorantaj nekonataloke.

En tiu nokto la ministro ne kaj ne ekdormi; konstante li ripetis al si: je la kvina alvenis la letero en la flava koverto, mi legis ĝin ĉe la skribotablo kaj foriris nur al vespermanĝo;

„Tak se podívejte, pánové," vykládal ministr uváděje sedm nejspolehlivějších mužů do své pracovny, “tady v té místnosti jsem včera nechal ležet jakýsi... eh, velmi důležitý dopis... ve žluté obálce... adresa fialovým inkoustem..."

Jeden z nejschopnějších mužů znalecky hvízdil: „Ten to tu zřídil," řekl s odborným obdivem, „zatracený prasák." „Kdo totiž?" děl ministr zaražen. „Ten zloděj," mýnil detektiv, pohlížeje kriticky na boží dopuštění v pracovně.

Pan ministr se slabě zarděl. „Totiž," řekl honem, „to jsem to tu tak trochu rozházel já, když jsem to hledal; to je tak, pánové, já... eh, já naprosto nemohu vyloučit, že ten dopis je někde tady... založený nebo zapadlý... Abych se vyjádřil přesně, nemůže být jinde než v této místnosti. Myslím, že... ano, tvrdil bych přímo, že by se měla tahle místnost systematicky prohledat. Ale to už je, pánové, vaše věc, abyste podnikli... co je v lidské moci."

V lidské moci je ledacos; proto tři z nejschopnějších mužů se zavřeli v pracovně, aby ji systematicky prohledali; dva vyslychali služku, kuchařku, domovníka a šoféra; a poslední dva se odebrali neznámo kam do města, aby, jak pravili, zahájili pátrání.

Večer toho dne prohlásili první tři z nejschopnějších, že je naprosto vyloučeno, aby ztracený dopis byl v pracovně pana ministra; neboť vyňali i obrazy z rámu, rozdělali nábytek a očíslovali každý list papíru. Druzí dva zjistili, že do ministrovy pracovny vkročila jenom služka, když na rozkaz paní Boženy tam donesla večeri, zatímco ministr seděl na zemi mezi svými papíry; jelikož není vyloučeno, že přitom mohla nějaký dopis odnést, bylo zahájeno pátrání, kdo je její milenec – byl to zřízenec od telefonní sítě, kterého nyní nenápadně střežil jeden muž. Poslední dva pátrali někde v neznámu.

Tu noc ministr ne a nemohl usnout; ustavičně si opakoval: v pět hodin ten dopis ve žluté obálce došel, četl jsem jej u psacího stolu a neodešel jsem nežli až kvečeři;

do la letero tie devis resti - kaj ne estas tie. Estis al li malgaje kaj naŭze pro la teda kaj entute neebbla mistero; li prenis dormigan pulvoron kaj dormis kiel ŝtupo ĝis mateno.

Matene li trovis, ke ĉirkaŭ lia domo (nesciate kial) vagas unu el la plej kapablaj; la ceteraj plej versimile komencis la esploron en la tuta respubliko. „La afero daŭras,” telefonis al li la ministro por internaj aferoj, „mi esperas, ke baldaŭ mi ricevos raporton; laŭ tio, sinjoro kolego, kion vi diris al mi pri la enhavo de la letero, ni povas diri, kiu havus intereson pri ĝi ... se ni povus fari domtraserĉon en iu sekretariejo aŭ iu redakcio, ni scius iom pli; sed mi diras al vi, la afero progresas.” La ministro senenergie dankis: li tre ĉagreniĝis kaj emis dormi. Fakte vespere nur tiel duonlaŭte li ion ekmurmuris kaj enlitiĝis.

Ĉirkaŭ la unua horo - estis hela lunnokto - aŭdis sinjorino Božena paŝojn en la biblioteko. Kaj ŝi armis sin per ĉia kuraĝo de eminenta edzino kaj iris piedpinte al la biblioteko. Plenlarĝe malfermita pordo, unu libroŝranko malfermita kaj antaŭ ĝi staris sinjoro ministro en noktoĉemizo kaj mallaŭte zumante ian kanton foliumis en iu volumo.

„Miadio, edzo,” elspiris sinjorino Božena, „kion vi ĉi tie faras?” „Mi volas nur ĉi tie rigardi,” diris la ministro necerte. „En mallumo?” miris sinjorino Božena. „Mi vidas,” asertis la ministro kaj envicigis la volumon. „Bonan nokton,” li diris duonlaŭte kaj iris malrapide en sian dormoĉambron. Sinjorino Božena kapskuis. Povrulo, ŝi diris al si, li ne povas dormi pro la malfeliĉa letero.

Matene post tio aspektis sinjoro ministro roze kaj preskaŭ kontente. „Mi petas vin,” diris sinjorino, „kion vi serĉis nokte en la biblioteko?” La ministro formetis la kuleron kaj ekokulis: „Mi? Kia ideo, mi ne estis en la biblioteko. Mi dormis ja kiel upupo.”

„Vlád'o, ja mi parolis tie kun vi! Vi foliumis en iu libro kaj diris, ke vi volas ion rigardi!” „Absurdaĵo,” diris la ministro malkonfide. „Eble vi ion songis.

ergo ten dopis tam musel zŭstat – a není tam. Bylo mu smutno a nevolno z té protivné a celkem nemožné záhady; i vzal si prášek pro spaní a spal jako dřevo až do rána.

Ráno shledal, že kolem jeho domu se (neznámo proč) potlouká jeden z nejschopnějších; ostatní nejspíš zahájili pátrání po celé republice. „Věc je v běhu,” telefonoval mu ministr vnitra, „doufám, že brzo dostanu hlášení; podle toho, pane kolego, co jste mi řekl o obsahu toho dopisu, můžeme říci, kdo by měl o něj zájem... Kdybychom mohli udělat domovní prohlídku v jednom sekretariátě nebo v jedné redakci, věděli bychom něco víc; ale říkám vám, věc je v běhu.” Ministr chabě děkoval; byl velmi rozmrzen a chtělo se mu spát. Skutečně také večer jen tak něco zabručel na půl huby a šel do postele.

Asi k jedné hodině – byla jasná měsíčná noc – slyšela paní Božena kroky v knihovně. I ozbrojila se veškerou statečností vynikající ženy a šla po špičkách ke knihovně. Dveře byly dokořán, jedna skříň knihovny otevřena a před ní stál pan ministr v noční košili a tiše broukaje listoval vážně v nějakém svazku.

„Proboha, muži,” vydechla paní Božena, „co to tu děláš?” „Ale chci se jen tady podívat,” řekl ministr neurčitě. „Potmě?” divila se paní Božena. „Já vidím,” tvrdil ministr a zastrčil svazek na své místo. „Dobrou noc,” řekl polohlasem a šel pomalu do své ložnice. Paní Božena zavrtěla hlavou. Chudák, řekla si, nemůže spát pro ten nešťastný dopis.

Ráno nato vypadal pan ministr růžově a téměř spokojeně. „Prosím tě,” povídá paní, „cos to v noci hledal v knihovně?” Ministr položil lžičku a vykulil oči: „Já? Co tě napadá, já jsem v knihovně nebyl. Já jsem ti spal jako dudek.”

„Ale Vlád'o, vždyť jsem tam s tebou mluvila! Listoval jsi v nějaké knize a řekl jsi, že se chceš na něco podívat!” „Nesmysl,” řekl ministr nedůvěřivě. Snad se ti něco zdálo.

Dum la tuta nokto mi ne vekigis."

„Vi staris ĉe la meza ŝranko," asertis la edzino, „kaj krome por tio vi eĉ ne lumigis. Vi foliumis en la libro sen lumo kaj ankoraŭ vi diris: Mi vidas."

La ministro ekkaptis la kapon. „Edzino," li impetdiris deprimite, „ĉu mi estas lunatiko? Pa," li trankviliĝis, „tion vi devis songi. Ja mi ne estas somnambulo." „Ĝi okazis je la unua," persistis sinjorino Božena kaj aldiris iom incitite: „Ĉu eble vi volas diri, ke mi estas frenezulo?" La ministro enpense kirlis per kulereto sian teon. „Mi petas vin," li diris subite, „montru al mi, kie ĝi estis."

Sinjorino Božena alkondukis lin en la bibliotekon. „Vi staris ĉi tie ĉe tiu ŝranko kaj envicigis iun volumon en ĉi tiun fakon." La ministro embarase kapskuis; en la fako estis kompleta kaj respektinda vico „Leĝaro kaj dekretaro". „Mi estas frenezulo," li murmuris, gratante sian nukon kaj eltiris preskaŭ mekanike iun volumon enigitan inverse. La volumo malfermiĝis en liaj manoj: en ĝi estis enmetita la flava koverto per violkoloro skribita adreso.

„Vidu, Boženka," miris sinjoro ministro, „mi estus ĵurinta, ke el la laborĉambro mi tute ne elpaŝis; sed nur nun mi iom neklare memoras, ke kiam mi estis traleginta la leteron, mi diris al mi: Nu, mi devas rigardi iun leĝon el la jaro dudek tri. Poste versimile mi alportis tiun libron sur la skribotablon kaj volis skribi noton; sed ĉar la volumo konstante fermiĝadis, mi metis tien probable tiun leteron - kaj poste plej versimile la libron mi klakfermis kaj mekanike forportis sur lokon - Sed ke mi iris en la libron subkonscie ensonĝe rigardi, tio estas, hm; sciu, al neniŭ diru pri tio. Oni povus pensi - Ne dece impresas ĉi tiuj misteraj psikologiaj fenomenoj."

Post tempeto jam sinjoro ministro plensone telefonis al la ministro por internaj aferoj: „Halo, sinjoro kolego, do tiun perditan leteron - Ba ne, vi ne trafis spuron; mi havas ĝin jam en la manoj!... Kio, kiel ĝi estis trovita? Sinjoro kolego, tion mi ne diros al vi.

Já jsem se po celou noc ani neprobudil."

„Stál jsi u té prostřední skříně," tvrdila paní, „a ještě k tomu sis ani nerozsvítil. Listoval jsi v té knize potmě a ještě jsi říkal: Já vidím." Ministr se chytil za hlavu. „Ženo," vyhrkl sevřeně, „copak jsem náměsíčný? Ale jdi," uklidňoval se, „to se ti muselo zdát. Já přece nejsem somnambul!" „Bylo to v jednu hodinu," stála paní Božena na svém a dodala trochu podrážděně: „Chceš snad říci, že já jsem blázen?" Ministr zamyšleně míchal lžičkou svůj čaj. „Prosím tě," řekl najednou, „ukáž mi, kde to bylo."

Paní Božena ho dovedla do knihovny. „Stál jsi tadyhle u té skříně a dával jsi nějaký svazek tady do té přihrádky." Ministr kroutil rozpačitě hlavou; v té přihrádce byla kompletní a úctyhodná řada Sbírek zákonů a nařízení. „To jsem blázen," bručel škrabaje se na záhlaví a vytáhl téměř mechanicky jeden svazek, který byl zasunut hlavou dolů. Svazek se mu v rukou otevřel: byla v něm vložena žlutá obálka s fialově psanou adresou.

„Vidíš, Boženko," divil se pan ministr, „já bych byl přísahal, že jsem z pracovny neudělal ani krok; ale teprve teď si tak nejasně vzpomínám, že když jsem si přečetl ten dopis, řekl jsem si: To se musím podívat na jeden zákon z roku třiadvacet. Pak jsem si asi donesl na psací stůl tu knihu a chtěl jsem si napsat poznámku; ale protože se mně ten svazek pořád zavíral, položil jsem tam podle všeho ten dopis - a pak jsem nejspíš knihu sklapl a mechanicky ji odnesl na místo - Ale že jsem se do té knihy šel podvědomě, že sna podívat, to je, hm; víš, neříkej o tom nikomu. Lidé by si třeba mysleli - Ono to nedělá slušný dojem, tyhlety záhadné psychologické úkazy."

Za chvíli pak už pan ministr hlaholně telefonoval ministrovi vnitra: „Haló, pane kolego, tak ten ztracený dopis - Ale kdepak, nejste na stopě; já už jej mám v rukou!... Cože, jak se našel? Pane kolego, to vám neřeknu.

Sciu, ekzistas metodoj, kiujn vi en la ministerio por internaj aferoj ankoraŭ ne scias. - Sed mi scias, viaj homoj faris plejblon - ili ne kulpas, ke ili ne altnivelas... Ne, prefere ni ne parolos pri tio. – Mi petas, petas. ... Servus, sinjoro kolego!"

Víte, jsou metody, které vy v ministerstvu vnitra ještě neznáte. – Ale já vím, vaši lidé dělali, co dovedou; za to oni nemohou, že nejsou na výši... Ne, nebudeme raději o tom mluvit. – Prosím, prosím... Servus, pane kolego!"